ESPERANTO
KOLEKTO DE LA REVUO



BRAZILIO

PAROLADO

DE

Sro EVERARDO BACKHEUSER

Prezidanto de la Brazila Ligo Esperantista.

Farita ĉe la « Societo de Geografio » en Parizo

SUB LA PREZIDO DE LIA EKSCELENCO

Sro GABRIEL DE PIZA

Plenrajta Ministro de Brazilio en Parizo.

FRANCE
LIBRAIRIE HACHETTE ET Cie
79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, PARIS.

BOHEMUJO, F. TOPIĈ, Ferdinandova 11, *PRAHA*. — **DANUJO**, ANDR.-FRED-HÖST & SÖN, Bredgade 35, *KJÖBENHAVN*. — **GERMANUJO**, ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Lindenstrasse, 18-19, *BERLIN*. — **GRANDA BRITUJO**, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, *LONDON W. C.* — **HISPANUJO**, J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, *BARCELONA*. — **ITALUJO**, R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, *LIVORNO*. — **RUMANUJO**, LIBRĂRIA NOUĂ CAROL P. SEGAL, Calea Victoriei, 78, *BUCAREȘTI*. — **POLUJO**, M. ARCT, 53, Nowy Swiat, *WARSZAWA*. — **UNUIGITAJ ŜTATOJ**, AMERICAN ESPERANTIST Co, 235 Fortieth Street, *CHICAGO*, kaj FLEMING H. REVELL, Company, 158, fifth Avenue, *NEW-YORK*.

SPE
CK

Librejo HACHETTE & K[io], 79, Boul. St-Germain, PARIS.

VERKARO DE D[ro] L. L. ZAMENHOF

Ĉiu Esperantisto devas nepre posedi la verkojn de nia Majstro!

INSTRUA FAKO

Fundamento de Esperanto :
Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola (*bind.*). Fr. 3 (*broŝ.*). Fr. 2 »

Oni vendas aparte { **Ekzercaro** (kvinlingva), (*broŝurita*). . . . . » 75
{ **Universala Vortaro** (kvinlingva), (*broŝurita*) . . . . 1 »

Eldonoj : Hispana; Itala, tradukita de S[ino] ROSA JUNCK; **Greka**, de S[o] KONSTANTINO KULURI; **Rumana**, de la « Societateă Esperantistă Romană ». (ĉiu). 1 »
Slovaka, de D[o] KARVAN kaj S[o] EVSTIFEIEFF. . . . . Kr. 1 50

En preparo — **Eldonoj : Bohema**, tradukata de S[o] KÜHNL; **Hungara**, de S[o] PAUL DE LENGYEL; **Turka**, de S[o] GUERON . . . . » »

Wœrterbuch Deutsch-Esperanto, dua eldono, revidita, korektita, pligita! Ĝi estas la vera komplemento de **Universala Vortaro**.
Unu volumo in-16, 178-paĝa (*broŝurita*). 2 50

Taschenwœrterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch.
Tre utila poŝa vortaro.
Unu volumo in-16, 137-paĝa (*broŝurita*). 1 50

LITERATURA FAKO

Fundamenta Krestomatio, Ekzercoj, Fabeloj kaj Legendoj, Rakontoj, El la vivo kaj Sciencoj, Artikoloj pri Esperanto, Poezioj. Ĝi estas la plej grava verko, kiun ĉiu devas legi por akiri perfektan stilon.
Unu volumo in-16, 460-paĝa . . . . Fr. 3 50

Georgo Dandin, komedio en tri aktoj, de MOLIÈRE.
Unu volumo in-8, 51-paĝa. 1 20

Hamleto, tragedio en kvin aktoj, de SHAKESPEARE.
Unu volumo in-16, 170-paĝa . . . . 2 »

Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj, de GOETHE.
Unu volumo in-8, 108-paĝa . . . . 2 »

La Revizoro, komedio en kvin aktoj, de N. V. GOGOL.
Unu volumo in-8, 100-paĝa 1 50

La Predikanto, libro el « LA BIBLIO ».
Unu volumo in-8, 28-paĝa . . . . » 75

La Psalmaro, libro el « LA BIBLIO ».
Unu volumo in-8, 165-paĝa 2 50

La Rabistoj, dramo en kvin aktoj, de SCHILLER.
Unu volumo in-8, 144-paĝa . . . . 2 »

La Sentencoj de Salomono, libro el « LA BIBLIO ».
Unu volumo in-8, 59-paĝa. 1 50

La Virineto de maro, fabelo de ANDERSEN, kun ilustrajoj de HILDA MAY BRODIE. El la Fundamenta Krestomatio.
Unu volumo in-8, 42-paĝa 1 50

5/18-1909,28




BRAZILIO





BRAZILIO



516
1.8.1986

PAROLADO

DE

Sro EVERARDO BACKHEUSER

Prezidanto de la Brazila Ligo Esperantista.

Farita ĉe la « Societo de Geografio » en Parizo

SUB LA PREZIDO DE LIA EKSCELENCO

Sro GABRIEL DE PIZA

Plenrajta Ministro de Brazilio en Parizo.

PARIS

LIBRAIRIE HACHETTE & Cie

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1909

Tous droits réservés.



BRAZILIO



La 9 de Decembro 1908, je la 9ª horo vespere, en la granda salono de la « Societo de Geografio » en Parizo, S° EVERARDO BACKHEUSER, helpa profesoro ĉe la Politeknika Lernejo de Rio de Janeiro, prezidanto de la Brazila Ligo Esperantista, faris paroladon pri sia lando.

La kunvenon prezidis lia ekscelenco S° GABRIEL DE PIZA, plenrajta ministro de Brazilio en Francujo.

Sur la estrado kune kun la prezidanto kaj la oratoro, sidis : Generalo H. SEBERT, membro de l' Akademio de l' Sciencoj en Parizo, prezidanto de la Konstanta Komitato de l' Universalaj Kongresoj de Esperanto, S° Prof° TH. CART, prezidanto de la Franca Societo por propagando de Esperanto, S° Prof° CARLO BOURLET, profesoro de mekaniko ĉe la nacia konservatorio de l' Artoj kaj Metioj en Parizo, prezidanto de la Pariza Grupo Esperantista, kaj diversaj eminentaj Esperantistoj francaj.

Profesoro BOURLET faris unue mallongan paroladeton por prezenti la oratoron al la publiko. Li faris ĝin en Esperanto, kaj poste tradukis ĝin mem francen.

Poste, sukcesplene kaj entuziasme aplaŭdata, S° EVERARDO BACKHEUSER faris sian paroladon, post kiu Profesoro BOURLET legis interesan leteron de S° FERNAND DORÉ, industriestro kaj prezidanto de la

Grupo Esperantisto en Troyes, kiu sciigis, ke dank' al Esperanto li povis havigi al si korespondantajn kaj komercajn interrilatojn en Brazilio.

Fine lia Moŝto, S° plenrajta ministro, GABRIEL DE PIZA, *diris kelkajn tre afablajn vortojn pri Francujo, pri la paroladinto, kaj pri Esperanto, kiuj vekis entuziasman aklamon.*

Tiu okazaĵo estas, kiel diris S° BOURLET, *kvazaŭ historia fakto, kaj cetere la parolado de S°* BACKHEUSER *estas interesplena resuma studo pri Brazilio, tial* La Revuo *opiniis, ke ĝi plezurigos la Esperantistojn kaj samtempe liveros al ili efikan propagandilon, publikigante la tekstojn de la* tri paroladoj *faritaj dum tiu memorinda vespero.*

Por ilustri la lumozajn klarigojn de la brazila oratoro, ni petis la eldonistan firmon Aillaud kaj K° *en Parizo, kiu estas konata en la tuta mondo pro siaj eldonaĵoj en portugala kaj franca lingvoj, ke ĝi bonvolu pruntedoni al ni kelkajn kliŝojn pri Brazilio, ĝi tion faris tre afable, kaj ni esprimas al ĝi nian koran dankon.*



PAROLADO

DE

PROF^o CARLO BOURLET.

Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Estas por mi duobla plezuro, ke mi havas la honoron prezenti al vi hodiaŭ mian scienculan amikon S^ron Everardo Backheuser; unue, ĉar ĉiutempe la Francoj kore simpatiis kun siaj brazilaj amikoj, fratoj pro politikaj ideoj, respublikanoj kiel ni, fratoj pro la lingvoj, ĉar la ilia kaj la nia ĉerpis siajn elementojn el la sama fonto.

Sed malgraŭ tiu komuneco de l' deveno, niaj du parolmanieroj senĉese diverĝante, fariĝis tiel diferencaj, ke ni nun ne scias plu nin kompreni reciproke. Kaj precipe tiuj lingvoj, filinoj de la sama patrino, nin pleje disigas per sia malsimileco.

Mia ĝojo duobliĝas do, ĉar mi fine konstatas la malaperon de tiu obstaklo, ĉar mi min prezentas al vi, parolante la saman harmonian lingvon, kiel mia kolego, neŭtralan rimedon por universala interkonsento.

La parolado de S^ro Everardo Backheuser estas okazaĵo kvazaŭhistoria. Ĝi signas gravan daton, ĝi estas nova etapo, kiun ni transpaŝas sur la vojo de l' progreso, nova ŝtono al la templo, kiun ni konstruas por la bono de l' homaro. Tio estas la unua fojo, kiam antaŭ la granda publiko oratoro uzas nian helpan lingvon, kaj ni ŝuldas grandan dankon al S^ro Backheuser, ĉar li faris al nia urbo la honoron, ke ĝi estu atestanto de tiu sentima iniciato.

Lia Moŝto, S^ro plenrajta Ministro de Brazilio, akceptante pre-

zidi tiun kunvenon, venante alporti al sia eminenta samlandano la apogon de sia nomo kaj de siaj titoloj, donas al ni novan pruvon pri la simpatio de sia lando al Francujo kaj pri la intereso, kiun ĝi havas al la disvastiĝo de Esperanto.

La registaro de la Franca Respubliko, ornaminte per la stelo de la Honora Legio la bruston de Dro Zamenhof, nia estimegata Majstro, hieraŭ lia Majesta Moŝto la Reĝo kaj ĉiuj Ministroj de Saksujo, konsentinte sian altan protektadon al nia lasta Kongreso, la Unuigitaj Ŝtatoj kaj Japanujo, riprezentigante sin tie oficiale, montris al ni, ke fine la registaroj komprenis la noblecon de nia aspirado kaj la utilecon de l' celo, kiun ni volas trafi.

Via ĉeesto tie ĉi, Sro Ministro, ebligas, ke ni esperu, ke siavice la registaro de Brazilio bonvolos nin helpi en tiu malfacila laborado; kaj mi respekte vin petas akcepti la esprimon de nia tre sincera dankemeco.



Fotog. Hachette et Cie, Paris.

Sº Everardo Backheuser.

Prezidanto de la Brazila Ligo Esperantista.

PAROLADO

DE

S[ro] EVERARDO BACKHEUSER.

Sinjorinoj,
S[ro] Ministro,
S[roj] Prezidantoj de la Centra Esperantista Oficejo, de la Franca Societo por propagando de Esperanto, de la Pariza Grupo Esperantista,
Sinjoroj,

Estas por mi tre agrabla okazo paroli antaŭ ĉeestantaro, kie mi vidas ĉu miajn samlandanojn brazilajn, ĉu miajn samideanojn parizajn.

Estas, gesinjoroj, ke antaŭ mi, mi nur vidas fratojn. Efektive fratoj estas la Brazilanoj, ĉar ni naskiĝis sub la sama hela suno, havas la samajn interesojn, kaj parolas la saman portugalan lingvon; sed fratoj estas ankaŭ la Esperantistoj, ĉar ni ankaŭ vivas sub la sama verda stelo, havas la samajn interesojn por la homa frateco kaj parolas la saman Zamenhofan lingvon.

Kiam oni estas inter fratoj, oni devas paroli sincere kaj senceremonie. Mi ne faros oratoradon, nur konversacion.

Tie ĉi mi iom diros pri Brazilio, kiu estas lando de vi malmulte konata kaj kelkafoje nekonata de la Eŭropanoj, kaj, ĉar mi parolas esperante antaŭ neesperantistoj, tiuj ĉi rimarkos, ke nia lingvo taŭgas por ĉio, eĉ por la patriotaj aferoj, kaj ke Esperanto ne estas malamiko de la naciaj lingvoj. — Tiamaniere per unu pafo mi mortigos du leporojn.

Nu, se mi propagandas samtempe lingvon kaj landon nekonatajn, juste estas, ke ili sin helpu reciproke. Kaj mi esperas, ke, forirante el tiu salono, la Esperantistoj montros al siaj konatuloj la riĉaĵojn, la bonan klimaton, la prosperecon de Brazilio, kaj ke la Braziloj siaflanke diros al ĉiuj, ke Esperanto estas mirinda lingvo, kaj ke Zamenhof estas granda homo.

Unu mano lavas la alian.

La dua rimarko, farota antaŭ ol komenci, estas, ke mia ĝojeco pligrandiĝas parolante antaŭ Francoj. Dum mia tuta parolo mi estos devigata ĉiumomente montri la grandan influon de Francujo sur Brazilion, ĉar efektive neniu lando, neniu popolo tiel fortike influis sur alian, kiel ĉi tiu bela lando sur la mian. Tial, mi trioble parolas antaŭ fratoj!

Kelkaj, kiuj neniam vojaĝis, imagas, ke ni sudamerikanoj estas aŭ sovaĝuloj aŭ negroj (mi tute ne parolas pri la ĉeestantoj, kiuj estas kompreneble kleruloj). Mi diras tamen, ke la sovaĝuloj, iom post iom, eniras en la centrajn partojn de la lando pro la kontinua kreskado de la eŭropa loĝantaro aŭ civiliziĝas per la laboro de la salesianaj pastroj kaj aliaj katolikaj apostoloj. La idoj de Tupan' (la dio de la brazilaj indianoj), fariĝas idoj de Jesuo kaj... de la Respubliko. Estas laboro kompreneble malrapida sed fruktodona.

En la Nacia Eskpozicio, kiu nun okazas en nia ĉefurbo, mirigante ĝin, kiel pruvo de la civilizacio inter la sovaĝuloj, estas plena muzikistaro de indianoj Bororós, ludante pecojn de famkonataj muzikverkistoj.

Ni ankaŭ ne estas nigruloj, kvankam tiuj, kiujn la Eŭropanoj alportis ĉe nin, tre forte influis sur nin, por doni al la popolo karakteron de afableco kaj modesteco. La Brazilanoj ne malamas — kiel la Usonanoj, — la negrojn, kiuj estas tre bonaj, tre viglaj laboristoj, kaj ĉe ni oni ne konas la bataladon inter la blankuloj kaj la neblankuloj.

Por pruvi, ke ni estas nek sovaĝuloj nek nigruloj, sufiĉas vidi la

parolanton, kiu estas tre vera Brazilano, naskita de gepatroj brazilaj en la centro mem de la lando,... kaj la aliajn samlandanojn, kiuj ĉeestas la paroladon. Estas posta pruvo, sed konkludanta mi opinias.

Kompreneble la klimato influas sur la koloron de la haŭto kaj de la haro, ĉar ni estas sub la Ekvatoro; sed ne sole sub la Ekvatoro. La lando estas tre granda; ĝi venas de 5 gradoj 9 minutoj de norda latitudo ĝis 33 gradoj 45 minutoj de la suda. Tial ni ne estas nur en la varmega zono, sed ankaŭ en la duonvarma, trans la Kaprikorna Tropiko. Tamen, eĉ en la varma parto de la lando, specialaj kaj bonaj kondiĉoj dolĉigas la veteron.

Efektive Brazilio havas tre grandajn arbarojn kaj tre potencajn riveregojn. Sufiĉas nomi la « Amazonas », kiu estas la plej granda el la mondo, la « Madeira », la « Purus », la « Tocantins », « Paranà », kiuj estas grandegaj, kaj « S. Francisco », « Parahyba », « Tiete », « Uruguay », kiuj estas grandaj. Se mi diras plie, ke estas altaj montaroj kaj kolosaj arbaroj eĉ en la varmega zono, kaj ke venteto neforta blovas tra la lando, vi tuj komprenos, kial la vetero estas kelkafoje tre dolĉa kaj tre agrabla, aŭ kial, per facila vojaĝo, oni povos ĉiam renkonti eŭropan printempan veteron.

Ekzemple : imagu, ke vi estas en Rio de Janeiro, granda ĉefurbo plena je altaj domoj, kaj nature varma; vi suferas pro la varmeco; vi prenos veturilon, kaj post kvarono da horo vi estos en Santa Fereja, en Tijuca, en Korkovado, mirindaj montetoj inter arbaroj kaj floroj, kie vi ĝuos tre dolĉan veteron.

Petropolis, urbo, kie loĝas la aristokrataj diplomatoj kaj la riĉuloj, estas je du horoj de Rio, kaj la ĉiutagan vojaĝon oni faras en elegantaj vaporŝipeto kaj vagonaro.

En Minas Geraes, provinco en la mezo de la lando, kaj en la sudaj provincoj de S. Paŭlo, Parana, Santa Catharina kaj Rio grande do Sul, la klimato estas tute simila al tiu de l' sudo de Italujo, tre oportuna do por la vivado de la Eŭropanoj malriĉaj, laboristoj, terkulturistoj, k. t. p.

Nun vi scias, ke la klimato ne malhelpos vian vivadon ĉe ni. Eble vi demandus, por pli bone koni la landon, kelkajn sciigojn pri ĝia historio, kaj kiu estas ĝia reĝo aŭ imperiestro. Tute simple kaj malmultevorte mi respondus, ke Brazilio estas konata de la Eŭropanoj nur de post la jaro 1500, kiam Pedro Alvares Cabral, ŝipestro portugala, hazarde, perdinte la vojon al Indio, alvenis al nekonata regiono, plena je specialaj ruĝaj arboj, similaj al fajro, al brulkarbaĵo (*brasa* en portugala lingvo), kaj al kiu li donis la nomon *Brazil*. Brazil — aŭ plibone Brazilio — restis kolonio de Portugalujo, kiu, priokupita de la indiaj aferoj, tiam altirantaj la atenton de la mondo, forgesis sian novan kolonion.

Nur post longa tempo, oni malkovris minojn de oro kaj de diamantoj.

Komenciĝas tiam la militoj, tio estas nia historio.

Portugaloj, Francoj, Hispanoj, Holandoj estas egale orsoifaj, kaj por havigi al si la altvaloran metalon ili batalis unue kontraŭ la enlandanoj por forigi ilin, kaj poste kompreneble unu kontraŭ la alian.

Post du jarcentoj da militoj kaj reciprokaj mortigadoj inter la diversaj popoloj, dezirantaj posedi la mirindan regionon, Brazilio civiliziĝis kaj ekpensis al libereco kaj respubliko.

Venas la unua okazo por rimarkigi la influon de Francujo sur nin. Efektive, kiam tra tiuj historiaj parizaj stratoj, la Francoj forĵetis la monarkon, Ludovikon Dek-sesan, la aristrokatojn, k. t. p., samtempe oni intencis tion fari en Brazilio. Sed la reĝo portugala, anstataŭ meti sur sian kapon la frigian kasketon, preferis sendi en malliberejon la revolucianojn kaj mortigi unu.

Poste venas Napoleono, kiu trairas la landojn detruante reĝojn, regnojn kaj popolojn. Kiam li sendis sian generalon Junot en Portugalujon, la reĝo — Don Joao Sesa —, anstataŭ batali senprofite, lasas sian popolon kaj, kune kun la reĝa sekvantaro, foriras en Brazilion, kien Napoleono ne povas persekuti lin. Li agis kiel pacemulo.

Dank' al tio, dum kelkaj jaroj, Rio de Janeiro estis la ĉefurbo de



Kliŝaĵo Aillaud kaj K°, Paris.

Rio de Janeiro.



Klisaĵo Aillaud kaj Ko, Paris

Arbo de mateo.



Klisaĵo Aillaud kaj K° Paris

Akvofalo de Paŭlo Affonso.

la portugala regno, kio donis al ĝi specialan gravecon kaj grandan honoron, kiujn Brazilio volis konservi, kiam D. Joao Sesa revenis Portugalujon, post la enŝloso de Napoleono en Sankta Heleno.

Pro tio, oni aklamis la filon de la reĝo imperiestro de Brazilio... kaj li akceptis.

La influo de Francujo estas do notinda sur la sendependecon de nia lando, kaj plezure ni konfesas la ŝuldon.

La sendependeco okazis en 1822, sekve Brazilio ne estas ankoraŭ centjara popolo. Post du imperiestroj, oni proklamis la respublikon. Oni ŝanĝis la politikan sistemon, ne ĵetante teren guteton da sango. Mi rimarkigas, ke Brazilio posedas la specialecon de revolucioj sensangaj.

Unu jaron antaŭ la Respubliko, oni abolicias la sklavecon, ankaŭ sen sango, afero por kiu la Unuigitaj Ŝtatoj devis organizi grandan kaj historian militon. Ĉe ni, tute ne. Post propagando voĉa kaj skriba, elmontrante, kiel sovaĝa estas la institucio de sklaveco, eĉ la posedantoj de sklavoj propravole donis al ili la liberecon. La dato de la fina abolicio de ĉiuj sklavoj estis atendata entuziasme, kaj la tuta popolo ĝin festis per floroj kaj aklamoj.

Tiuj du grandaj aliformiĝoj, ekonomia kaj politika, estas sekvitaj de aliaj tre gravaj, kiujn kelkaj popoloj ankoraŭ pridiskutas kaj timas fine decidi pro la eblaj agitadoj, nome : la disigo de la Eklezioj de la Ŝtato, la principo de deviga arbitracio, la abolicio de la puno per morto, la plenega libereco de la gazetaro kaj de opinio sen ia kontrolo, la federacio, k. t. p.

Ankoraŭ tiurilate la granda lando de la enciklopedistoj kaj de la Revolucio influis sur la novan amerikan Respublikon. Estis per la konsiloj de la eminenta franca filozofo Aŭgusto Comte propagandataj de liaj disciploj brazilaj, Benjamin Constant kaj aliaj, ke oni agis en la komenco de nia respubliko. Tiamaniere ni sankciis, kiel nacian daton, la dek-kvaran de Julio, kiu apartenante unue nur al Francujo apartenas hodiaŭ al la tuta Homaro. Tio signifas

por la patrujo de la seninteresaj kaj grandanimaj ideoj pruvo de tre granda simpatio kaj amikeco!

Post la respubliko, Brazilio marŝis rapide en la vojon de l' progreso. Kompreneble kelkaj agitadoj politikaj aperis en la komenco, kaj eĉ civilan militon ni havis dum mallonga tempo. Feliĉe la registaro venkis, kaj la ordo reeniris en la landon por restadi. La paco reĝas ĉe ni, kaj ĝi reĝos, ĉar la popolo sin priokupas pli pri la laboro, ol pri la politiko.

Mi ne povas kaj ne volas diri tie ĉi la agadon de ĉiu prezidanto. Mi parolos nur pri la ĉefaj okazaĵoj, kaj la plej grava estas certe la renaskiĝo aŭ aliformiĝo de nia ĉefurbo dum la mallonga daŭro de kvar jaroj.

Rio de Janeiro, kiel preskaŭ ĉiuj koloniaj urboj, estis neracie konstruita. Nenia ajn plano, nenia ajn ideo pri la ebla estonto de la eknaskiĝanta urbo gvidis la unuan loĝantaron kaj ĝiajn unuajn estrojn. Ĝi ekaperis iom post iom, inter mirinda naturo, en la flankoj de belaj montetoj, apud eksterordinara golfeto, konvena ĉu kiel komerca ĉu kiel milita haveno, ĉirkaŭita de vidindaj montaroj... sed tute, tutege, senregule. La stratoj estis mallarĝaj, la domaro malbela, kaj preskaŭ neniu ĝardeno aŭ skvaro, kvankam nia klimato, dum la kvar sezonoj, estas tre favora al la apero de ĉiuspecaj floroj kaj ombraj arboj.

Dum longa tempo la urbo restis tiele, kaj kompreneble en tiuj malbonegaj kondiĉoj malsanoj ekaperis kaj enradikiĝis. Famon de malsaneco ĝi dissemadis kaj la fremduloj timis, timegis Rio de Janeiro, kiel ejon de teruraj malsanoj, kaj precipe de la malagrabla flava febro.

Ne nur la ĉefurbon atingis la famo, sed, per bedaŭrinda kvankam komprenebla ĝeneraligo, la tutan landon. La fremduloj juĝas landojn aŭ regionojn laŭ la ĉeflokoj. Estas kelkajn fojojn grava, gravega eraro, kiun tamen ĉiuj faras. Rilate al Brazilio la eraro estis gravega, ĉar nur en Rio de Janeiro estis la flava febro.

Vera aŭ mensonga, la fakto nediskutebla estis, ke la eksterlandanoj opiniis la tutan Brazilion terura malsanigejo.

Multe oni studis por malaperigi la teruran malsanon. Kuracistoj kaj higienistoj, en- kaj ekster-landaj pripensis pri tio. Neniu kaptis la rimedon forigi ĝin.

S[ro] Rodrigues Alves, kiu estas nek kuracisto, nek higienisto, sed kiu estis prezidanto de la Respubliko, solvis la demandon dirante, ke por resanigi la urbon, al ĝi donante bonan famon kaj sekve al la lando, kaj por malaperigi la flavan febron, necese estas detrui la malnovan urbon kaj denove ĝin rekonstrui almenaŭ parte. Alivorte, ke unufoje, kiam la naturo ne donas al ni termovon, la homoj efektivigu ĝin.

Por tiu laboro granda, grandega, li elektis eminentulojn, inĝenierojn konatajn pro ilia laboremeco kaj al ili konfidis la taskon de ministroj, urbestro k. t. p.; ĉar, laŭ nia prezidanteca sistemo, estas la prezidanto mem, kiu elektas la ministraron, sen konsiliĝo kun la parlamento.

La urbestro, al kiu apartenas la gloro de la aliformigo de Rio de Janeiro, estas S[ro] Pereira Passos, nomata la brazila Haussmann.

« En laboro patruja ne laciĝu », jen la krio de ĉiuj helpantoj de la prezidanto. Kaj oni laboras, oni laboradas.

Mirinda detruado kaj mirindega rekonstruado dum kvar jaroj. La malnova urbo malaperas sub la pikfosiloj de la laboristoj; domoj post domoj venis teren. Ĉie kaj ĉiel nuboj de polvo altiĝas en la tuta urbo, kiel signo de domoj detruataj.

Subite, larĝaj bulvardoj aperas tie, kie antaŭe estis mallumaj stratetoj. Tie kaj ĉi tie florozaj ĝardenoj kaj grandaj domegoj apud la maro, la belega maro de nia golfeto, sekvante ĝian kurban linioavenuon, kiu restos unu el la ĉefaj vidindaĵoj de l' mondo.

Krom tio, vigla batalado kontraŭ la kuloj (moskitoj), kiuj, post la eksperimentoj en Habano, estis konitaj, kiel la veturiloj de la mikroboj de flava febro.

Dank' al tiuj senlacaj kaj lertaj laboroj Rio de Janeiro estas hodiaŭ rimarkinda urbo, ĉu pro sia senegala naturo, ĉu pro sia nekonata beleco, ĉu pro sia koeficiento de morteco, unu el la plej malgrandaj koeficientoj de la grandaj popolozaj metropoloj.

Tiuj ĉi favoraj cirkonstancoj, la definitiva malapero de la flava febro (la statistikoj tion pruvas), la aliformiĝo de la urbo kaj ĝia resaniĝo, la venteto, kiu povas blovi nun tra la larĝaj bulvardoj dolĉigante la veteron, ĉio ĉi ebligas, ke mi diru al vi laŭte, amike kaj sentime, ke vi povos vojaĝi Brazilion, ĉar mi estas certa, ke endemiaj malsanoj ne kaptos vin tra la vojo.

Iru! Vi vidos per viaj propraj okuloj ĉarman regionon, belegan naturon kaj civilizitan landon.

Vi rimarkos ankaŭ la fieregecon de la Brazilanoj, pro la grandeco kaj rapideco de ilia laborado, pro la ebla apero de junuloj eminentaj, kiel la nuna ministro de la publikaj laboroj, kiu estas nur dudekjara, kio garantias la daŭrigon de la necesa batalado por la baldaŭa plialtiĝo de nia lando al la rango de la grandaj potencoj.

Ankaŭ vi renkontos, en Brazilio, kleran loĝantaron, kiu konas viajn verkistojn literaturajn kaj sciencajn; kaj ankaŭ naciajn originalajn romanistojn kiel Coetho Netto, Machado de Assis, Jose de Alencar k. t. p. kaj poetojn talentozajn.

Ĉar kelkaj poezioj estas tradukitaj esperanten, mi legos ilin, kvankam ili ne estas la plej rimarkindaj.

Jen unu soneto de Olivo Bilac, tradukita de nia bona samideano S° Daltro Santos :

AŬDI STELOJN

« Nu (vi parolos) aŭdi stelojn! Certe
La saĝon perdis vi! » Mi diros tamen,
Ke por aŭdi la stelojn mi vekiĝas,
Kaj mi malfermas la fenestron pale....

Kaj ni babilas, dum la lakta vojo,
Kiel mantelo malfermita, supre
Briletas. Kaj, la suno alveninte,
Ilin mi serĉas tra l' ĉiel ' ankoraŭ.

Vi diros nun : « Mia freneza amiko!
Kion kun ili vi parolas nokte?
Kion iliaj frazoj al vi diras? »

Kaj mi diros : « Por ilin aŭdi amu!
Ĉar povas havi nur l'amant' orelojn
Kapablajn aŭdi kaj kompreni stelojn. »

Mi legas alian soneton de brazila poeto Raymundo Correa, tradukitan ankaŭ de S^o^ Daltro Santos :

SEKRETA MALBONO

Se la koler' ŝaŭmanta, la doloro,
Mortigantaj l' animajn iluziojn,
Ĉio, kio la koron turmentegas
Sur la vizaĝo sin gravurus klare;

Se l' animon plorantan oni povus
Rigardi tra la masko de l' mieno,
Kiom da homoj, kiuj nun l' envion
Al ĉiuj kaŭzas, la kompaton kaŭzus!

Kiom da homoj, eble, kiuj ridas,
Portas kun si kruelan malamikon,
Kiel doloran vundon nevideblan!

Kiom da homoj, kiuj ridas, estas,
Kies sola feliĉo nur konsistas
En feliĉuloj al aliaj ŝajni.

Bedaŭrinde mi ne havas sufiĉe da tempo por legi ĉi tie pecojn de prozaĵoj, sed en la konata libro « Esperantaj prozaĵoj » vi renkontos la « Tri gutoj » de Coelho Netto, en la kolekto de « La Revuo » interesplenan rakonton de Machado de Assis, en « Germana Esperanto Gazeto » ĉarman infanan priskribon de la verkistino Julia Lopes de Almeida, kaj aliajn en la « Brazila Revuo Esperantista ».

Ankaŭ klerajn filozofojn, eminentajn profesorojn kaj lertajn specialistojn Brazilio naskis. Mi ne volas citi nomojn, sed la de vi tre konata aerveturisto Santos Dumont estas Brazilano, kiel mia samlandano estas la pastro Bartholomen de Jumiao, kiu multe da tempo antaŭ la fratoj Montgolfier elpensis la balonon, kaj science ne hazarde konstruis ĝin.

Vi rimarkos ankaŭ, ke nia industrio multe progresadas senĉese, kaj ke kelkajn el ili hodiaŭ oni povas konsideri tute sendependaj.

Por helpi ilin, la naturo donacis al ni grandajn, grandegajn akvofalojn, en la tuta teritorio. Riveregoj trapasantaj regionojn jen altajn, jen malaltajn, naskas kompreneble potencajn falojn, fontoj de tiel grandaj riĉecoj, ke la industriistoj ilin nomas : la *blanka terkarbo*.

Minojn de blanka terkarbo Brazilio posedas ĉie por faciligi kaj por malplialtigi la prezojn de la elektra forto.

Grandegaj fabrikegoj de elektro por la lumigado de grandaj urboj de S. Paŭlo, Rio de Janeiro, Niteroi, k. t. p., profitas la akvofalojn de Rio Tiété, Ribeirao das Lages e Rio Parahyba.

Ĉiuj el tiuj grandvaloraj *minoj* ne estas ankoraŭ ekspluatataj, kaj oni renkontas multajn utiligeblajn, kio garantias al nia industrio kaj al la kapitaloj en ĝi enmetitaj tre belan estonton.

Mi komencante diris, ke en mia lando la klimato kaj aliaj kondiĉoj helpas ĉiuspecajn kulturadojn.

Unuavice, la kafo. La kafo de Brazilio estas eble la sola, kiun

oni trinkas en la tuta mondo, ĉar mia lando produktas jare 20 milionojn da sakoj, dum ĉiuj aliaj landoj produktas nur tri milionojn. Krom tio la kafo brazila estas tre bona.

La kafarboj kreskas en zono mezvarma de Espérito Santo, Rio de Janeiro, Minas Geraes, kaj precipe en S. Paŭlo, kies ruĝa argilo estas, mi opinias, speciale ĵetita de Dio teren por fariĝi ujo de radikoj de kafarboj.

La kafarboj ne estas grandaj, kaj ilia kulturado estas facila. Oni plantas ilin en linioj paralelaj tre regulaj; tiamaniere, ke la kafarbejoj estas facile rekoneblaj je unuavido.

Por la rikolto la estroj de la *fazenda* (farmejo) bezonas tiom da laboristoj, kiom estas eble havigi, ĉar estas laboro, kiun oni devas fari kiel eble plej rapide en la konvena sezono.

La fruktoj, kiuj sur la arbo estas ruĝaj kiel ĉerizoj, estas poste sekigataj per la varmo de la suno aŭ per specialaj iloj. Oni eltiras la malmolan kernon, kaj enmetas ĝin en sakojn. El Santos kaj Rio, kiuj estas la ĉefaj laborejoj de Brazilio, ĝi iras eksterlanden.

Ŝajnas al mi, ke la diferenco inter la kafo trinkata tie ĉi kaj ĉe ni devenas nur de la preparado. Jen kiel oni ĝin preparas, ĉu en la *fazendas* ĉu en la bonaj kafejoj de Brazilio. Post la bruligo de la kafo, oni muelas ĝin kiel eble plej maldike. Tiu punkto estas notinda, ĉar, se la grajnoj estas iomete grandaj, la kafo ne estos bona. Por la kafinfuzo, la ĉefa brazila aparato estas tute simpla sako katuna konusforma. Por ke ĝi perdu la kotonan odoron, oni lasas ĝin sufiĉe da tempo en infuzo de kafo. Oni ĵetas, laŭ la proporcio de 10 aŭ 15 gramoj por persono, la kafon en la sakon kaj sur ĝin akvon bolantan tre malrapide. La kafo bolas, kaj el la malsupro de la sako fluas tre bonodora nigra, nigrega akvo, kiu estas nia kafo.

Kiel dua artikolo por eksporti venas la kaŭĉuko, kies mirindajn aplikaĵojn neniu povas ignori. La kaŭĉukarbo kreskas en la nordo

de nia lando, en Amazonas, Pava' kaj Acre. Per tre facila metodo oni eltiras la *latex* el la kaŭĉukarbo : sufiĉas haki la trunkon de la arbo, iu lakto eliras, kaj oni kaptas ĝin en oportuna ujo. Kemia rapida preparo igas pli pura la kaŭĉukon.

La amazona kaŭĉuko estas la plej bona en la mondo pro siaj kondiĉoj de pureco kaj elasteco. Ĝi ricevis la unuan premion en la Londona Ekspozicio. Brazilio produktas la duonon de la universala produktado, kaj, kiel nia kafo, nia kaŭĉuko iras precipe en Usonon.

Alia produktaĵo brazila tre ŝatata estas la kotono, kulturata en Pernambuco kaj ĉirkaŭaĵoj. La specialistoj lokas ĝin sur la unua rango, kiel kvalito; tamen Brazilio ankoraŭ estas kvinranga inter la landoj, kiuj produktas la kotonon.

Sukero de sukerkano estas pli agrabla kaj dolĉa, ol sukero de la ruĝa beto, kaj pro tio pli ŝatata de ĉiuj, kiuj ĝin konas. En Brazilio estas grandaj kulturoj de sukerkano, precipe en la ŝtatoj de Pernambuco kaj najbaroj. Sed ankaŭ en Rio de Janeiro kaj S. Paŭlo estas grandaj fabrikejoj de kansukero, nia amiko kaj konata Esperantisto Fernand Doré posedas, kune kun aliaj, kelkajn el tiuj fabrikejoj, kaj ili diras, ke ili bone sukcesas.

Alia produktaĵo brazila estas la *mateo*, kiu estas tre simila al la teo, sed enhavante grandajn kvalitojn de nutrigo kaj higieneco.

La *mateo* estas tre ŝatata en la landoj de la sudo de Ameriko (Urugŭajo, Paragŭajo, Argentinujo, Ĉilio) kaj en la provincoj de l' sudo de Brazilio. Ĝi ne ankoraŭ eniris en la kutimoj de trinkado de la Eŭropanoj.

Pri la fruktoj brazilaj kion diri? En la partoj altaj de l' montaroj oni kulturas viajn pirojn, viajn terpomojn, viajn vinberojn, viajn ĉerizojn k. t. p.. Krom tio, ni havas la bongustajn kaj specialajn fruktojn de la tropikoj : la belajn orkolorajn oranĝojn, dolĉajn kiel mielo ; la molan flavan bananon, unu el la plej nutrigaj fruktoj ;



Kliŝaĵo Aillaud kaj K^o, Paris.

Avenuo Marborda (Rio de Janeiro).



Kliŝaĵo Aillaud kaj Ko, Paris.

Kaŭĉukarbo.



Kliŝaĵo Aillaud kaj Ko, Paris.

Kafejo.

la agrablan *abacaxi* (speco de ananaso, sed pli bona); la mangon, la cajú, la gviabon k. t. p.

Estas neeble daŭrigi la nomaron de ĉiuj produktoj, kiuj aperas en Brazilio. Vi permesos, ke mi citu nur kelkajn el la plej rimarkindaj.

La kakao, per kiu oni preparas la ĉokoladon : ni eksportas proksimume 25 milion kilogramojn.

La tabako, kiu kreskas en Rio Grande do Sul, Minas, Goyaz. Ĝi estas bonkvalita, kaj oni fabrikas cigarojn tiel bonajn, kiel la famkonatajn de Habano. La cigaroj nomataj « de Hamburgo » venas de Bahia.

La cerealoj, nome la rizo; la nutraj fazeoloj, tiel ŝatataj ĉe ni; *la maizo*, nutraĵo certe pli bona ol la greno; la greno mem, la manioko, la batatoj, k. t. p.

Plie : lignoj por konstruado de domoj, de ŝipoj, por la meblofarado, por traboj fervojaj, por la kolorigarto, k. t. p. estas eltirataj el niaj virgaj arbaroj. La kolekto de brazilaj lignoj ricevis la unuan premion en la amerika ekspozicio de Saint-Louis.

Alia fonto de riĉeco estas la kamparoj de Rio Grande do Sul, Parana, Piaŭlu, kie vivas la brutaro. En ili bovoj, ĉevaloj, porkoj, ŝafoj, azenoj tre bone fartas kaj sin nutras sufiĉe. Kiel konsekvenco, naskiĝis la industrioj pri butero, fromaĝo, kazeo, kiuj bone prosperas.

Ĝis nun mi parolis pri la riĉaĵoj kaj riĉecoj de la supraĵo de la tero. Nun venas la momento diri du vortojn pri tiuj de la subaĵo, t. e. de la minoj de oro, mangano, fero, kupro, diamantoj, k. t. p.

Mi parolos malmulte, ĉar mi timas komenci, tial ke, kiel specialisto pri tiu afero, mi facile plilongigus nian konversacion priskribante la orajn minojn de Minas Geraes e Goyaz treege profitdonajn, tiujn de mangano, kie la ekspluato estas facilega, ĉar oni renkontas la mineralon ĉe la supro de la tero, kaj oni ĵetas

ĝin sur la vagonaron preskaŭ sen subfoso de la tero; kaj aliaj.

Ekzemple, la helaj diamantoj estas renkonteblaj en la riveroj. Unu el la plej famkonataj diamantoj de l' mondo pro sia grandeco kaj brilo estas la *Suda Stelo*, kiu estas brazila. Krom la blankaj kaj lumozaj, kiujn la sinjorinoj tre ŝatas, estas aliaj nigraj *carbonados* tre necesaj al la industrio, kaj kiujn la Provinco Bahia eksportas.

Sed mi haltas pri tiu afero mineralogia.

Vi komprenas, ke Brazilio ne estus civilizita lando, se ĝi nur posedus terkulturon kaj nenian industrion kaj komercon. Ĝi posedas ilin, kompreneble ne ĉiujn, sed kelkajn.

Por la interna uzado, oni jam fabrikas multe da aferoj, kiuj estas facile disvendataj. Kelkaj industrioj, tiel bone prosperas, ke ni ne bezonas plu enporti fremdajn artikolojn.

Sed aliajn, ni bezonas, kaj, pro tio, naskiĝas la internacia komerco.

Ĝis nun mi parolis pri la estinto kaj la estanto.

Kio estos la estonto de lando tiel riĉa kaj tiel laborema? Ŝajnas al mi, ne imagebla. Mi devas paroli, ne kiel Brazilano, sed kiel observanto de aferoj

Tamen por plidisvolviĝi, Brazilio bezonas, bezonegas, ke Eŭropo helpos ĝin dumaniere : sendi homojn por vivigi la virgajn arbarojn, por kreskigi la industriojn kaj la komercon, kaj prunti monon por aktivigi la grandajn entreprenojn.

Homoj kaj mono estas kiel la karbo por la lokomotivoj : estas necese ĵeti ilin en la fajrejon, por ke la movo komenciĝu.

Tre ofte pumpo ne pumpas akvon el puto, ĉar la klapoj estas sekaj. Se malgranda kvanto da akvo falas sur ilin, tuj la aersenigo komenciĝas, kaj grandega kvanto da akvo fluas el la pumpo.

Tia estas nia afero; ĵetu kelke da akvo en la brazilan pumpon, kaj tuj aperos tiom da bona fluidaĵo, ke vi ĉiuj riĉiĝos.

Kalkulu ni unue pri la brakoj necesaj al la laborado de la tero.

La brazila loĝantaro estas 21 milion loĝantoj kaj la areo proksimume 8 milion kaj duono kilometroj kvadrataj; sekve la proporcio estas po 2 kaj duono loĝantoj por kilometro.

Komparu nun kun Francujo. Ĝi havas areon dek-ses fojojn malpli grandan kaj loĝantaron preskaŭ duoblan. Tio signifas, ke, se nia loĝantaro estus proporcia je tiu de Francujo, Brazilio havus preskaŭ sescent-kvardek milionojn.

Tial la respubliko sudamerika povos akcepti — kaj ĝoje akceptos — ankoraŭ pli ol sescent milonojn da loĝantoj, kiuj donos al ĝi siajn laboron kaj inteligenton kaj ricevos, siaflanke, eblojn por agadi kaj riĉiĝadi.

Longatempe la Eŭropanoj ne iris Brazilion, ĉar ili timis la endemiajn kaj enlandajn malsanojn, sed precipe la flavan febron.

Sed nune, kiam tiu fama malsano malaperis? Neniun kaŭzon mi renkontus, por ke la Eŭropanoj persistu en sia antaŭjuĝo pri Brazilio, se mi ne imagus ebla la nekonado de la nuna stato de ĝia saneco kaj prospereco.

Kelkaj Francoj, ekzemple S^ro Turot, pariza urba konsilanto, kiuj vizitis Rion aŭ S. Paŭlon, estis tiel ĉarmitaj per iliaj vidindaĵoj, ke ili tuj aĉetis teron por tie konstrui domojn aŭ aranĝi terkulturaĵojn.

Cetere, la brazila estraro faciligas la vojaĝon de la familioj de fremdaj terkulturistoj, kiuj, ne posedante sufiĉe da mono, tamen deziras tien iri. Ĝi pagas la iran bileton, ĝi pruntedonas porcion da tero (dudek-kvin ĝis kvindek hektaroj) kaj unu dometon, kiujn la enmigranta familio pagos iom post iom en la daŭro de kvin jaroj minimume; ĝi donacas la terkulturilojn kaj semojn. Kompreneble la eŭropaj elmigrantoj, por akcepti tiujn favorojn, ne estas devigataj subskribi iun ajn kontrakton por restadi tie. Ili povos reveni, kiam ili volos.

Krom tio, la respublika konstitucio, kies aŭtoroj agis tiurilate kiel homoj kaj ne kiel simplaj Brazilanoj, donas al la fremduloj

la rajtojn, kiujn posedas la enlandanoj. Fremduloj, ĉe ni, povas ricevi honorojn, titolojn, publikajn oficojn, eniri en la militistaron kaj en la nacian gvardion, esti elektitaj deputitoj, senatanoj kaj ministroj. *Nur* al ili estas malpermesata esti prezidanto kaj vicprezidanto de la Respubliko kaj de la Provincoj.

Jen kion mi opinias konvene diri pri la neceso de homoj.

Cetere, Brazilio ankaŭ bezonas la eŭropajn kapitalojn. Ne nur Brazilio venas en la malnovan mondon peti monon. La Unuigitaj Ŝtatoj, kiuj estas tre granda kaj prosperema lando, ankaŭ petas la helpon de la Eŭropanoj. La afero estas, ke nur en Eŭropo, kaj precipe en Francujo, kie la ŝparemeco estas tre ĝenerala kaj tre laŭdinda kvalito, oni povas ricevi la rimedojn por movigi la entreprenojn transoceanajn.

Ĉi tie vi havas la kapitalojn senmovajn kaj tial ne reproduktemajn. Tie estas neimageblaj iloj por multobligi ilin. Ni bezonas vian monhelpon por vivigi niajn senhavajn regionojn per fervojoj, per industrioj ĉiuspecaj.

Ni jam posedas dek-ok mil kilometrojn da fervojoj, ni konstruas kvar mil novajn kilometrojn, sed ni bezonas la dekoblon.


Ni havas grandajn regionojn kulturatajn, sed ankoraŭ pligrandaj estas preskaŭ nekonataj.

Ĉe ni estas belaj kaj gravaj fabrikejoj, sed lokaj hidraŭlikaj fortoj ekzistas, por ke novaj aperu kaj sukcesu.

Tiamaniere, gesinjoroj, Brazilio estas granda lando plena je estonteco, al kiu mankas nur malgranda helpo.

La Eŭropanoj kaj precipe la Latinoj, kiuj deziras la daŭrigon de la civilizo grekroma, bonvolu ĝin helpi.

Ĝi venkos!



Fotog. Pirou, rue Royale, Paris.

Lia ekscelenco S° GABRIEL DE PIZA.

Plenrajta Ministro de Brazilio en Parizo.

PAROLADO

DE

LIA EKSCELENCO S° GABRIEL DE PIZA.

Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Mi tre sincere dankas S^on Carlo Bourlet, ĉar li proponis al mi la honoron prezidi tiun kunvenon kaj aŭdi, ĉirkaŭita de eminentaj scienculoj, paroladon, kiun li pretendas kvazaŭ-historia.

Mi estas fiera, ke unu el miaj samlandanoj, kaj unu el la plej bonaj, tion iniciatis kun la helpo de kelkaj bonaj amikoj brazilaj.

Estas por mi vera ĝojo, ke mi kvazaŭ vidas la formiĝon de nova lingvo, bela kaj harmonia, kiu jam montriĝis utila por amika interkonsento inter popoloj.

Normale provizitaj de reciproke simpatiaj instinktoj, kiujn ili ĉiam devas kulturi, la homoj renkontas, pro la malsameco de l' lingvoj, gravajn obstaklojn al la transdiro de siaj sociaj sentoj.

Grandan servon oni faras al la homaro, liverante al ĝi klaran kaj precizan rimedon por pligrandigi la sociemecon, kiu estas la plej alta karakterizo de l' homa gento.

Ni danku do la kreinton kaj la propagandistojn de la nova lingvo, kiun ni ĵus aŭdis. Ili pretigas preciozan ilon por la solvo de l' granda problemo pri la kunigo de l' homoj. Ili forĝas potencan kaj vere efikan levilon por la milito por universala frateco.

Ne nur la grandaj inteligentoj laboradas por la bono de l' Homaro, sed precipe la riĉaj kaj malavaraj koroj, kiuj sin donas fervore al la produktivaj verkoj pri sociemeco.

Al la virina koro, plej riĉa pri noblaj sentoj kaj profundaj korligoj, oni devas konfidi la taskon de la disvastigo de tiu nova lingvo, destinita al faciligo de homa frateco. La nekontraŭstarebla apogo de l' virinoj ĝin sukcesigos ĉie. Sub ilia protektado kaj el iliaj lipoj Esperanto rapide kaj brilege triumfos.

« La amema sekso, la morala providenco de nia gento, estas la superega privata arbitraciantto de l'universala edukado », diris Aŭgusto Comte.

Per ĝia sistema penado ni vidos la triumfon de nia granda idealo kaj la efektiviĝon de niaj karaj esperoj pri pli bona homaro.



TABELO DE LA ENHAVO

ANTAŬKLARIGO 5

Parolado de S^ro CARLO BOURLET 7

Parolado de S^ro EVERARDO BACKHEUSER 9

Parolado de S^ro GABRIEL DE PIZA 25

KOLEKTO DE " LA REVUO "

LITERATURA FAKO

Angla lingvo sen profesoro, unuakta komedio de TRISTAN BERNARD, tradukita de GASTON MOCH.

Unu volumo in-8, 44-paĝa . . . . Fr. 1 »

Aspazio, tragedio en kvin aktoj, de A. SVJENTOĤOVSKI, trad. de Dro LEONO ZAMENHOF.

Unu volumo in-8, 154-paĝa 2 50

Brazilio, parolado de So EVERARDO BACKHEUSER.

Unu volumo in-8, 28-paĝa, kun ilustraĵoj ekstertekste . . . . » »

Bukedo, artikoloj pri literaturaj kaj beletristikaj demandoj, de CH. LAMBERT.

Unu volumo in-8, 159-paĝa . . . . 2 »

Imenlago, novelo de THEODOR STORM, trad. de ALFRED BADER.

Unu volumo in-8, 33-paĝa . . . . » 75

La libro de l' Humoraĵo, originale verkita de PAUL DE LENGYEL.

Unu volumo in-8, 194-paĝa 2 50

La Faraono, romano de PRUS, tradukita el la pola lingvo de Do BEIN.

Unua volumo in-8, 194-paĝa. . . . . 2 »

Dua volumo in-8, 238-paĝa . . . . 2 »

Tria volumo in-8, 191-paĝa . . . . 2 »

La Reĝo de la montoj, de ED. ABOUT, trad. de G. MOCH. GUSTAVE DORÉ.

Unu volumo in-8, 245-paĝa 3 50

La Rompantoj, kvin monologoj originale verkitaj de FR. PUĴULA-VALJÈS.

Unu volumo in-8, kun ilustraĵoj, 40-paĝa . . . . 1 »

La Tria, memoraĵoj pri la Tria Kongreso.

Unu volumo in-8, 46-paĝa, ilustraĵoj ekstertekste. 1 50

Laŭroj, kolekto de premiitaj verkoj en la Unua literatura konkurso de « La Revuo ».

Unu volumo in-8, 142-paĝa . . . . 2 »

Makbeto, kvinakta dramo de SHAKESPEARE, tradukita de Do LAMBERT.

Unu volumo in-8, 125-paĝa . . . . 2 »

TEKNIKA KOLEKTO

Anatomia vortaro (en latina, franca, angla kaj esperanta lingvoj), verkita de la MEDICINA ESPERANTISTA GRUPO.
Unu volumo in-8 . . . . Fr. 1 50

Komercaj leteroj en Esperanto, kun vortareto kvarlingva, de P. BERTHELOT kaj CH. LAMBERT.
Unu volumo in-16. . . . . » 50

La komerca sekretario, de Ros. SUDRIA.
Unu volumo in-16. . . . . » 50

Matematika terminaro kaj krestomatio, de R. BRICARD.
Unu volumo in-16. . . . . » 75

Monadologio, de LEIBNIZ, tradukita de E. BOIRAC.
Unu volumo in-16. . . . . » 60

Muzika terminaro, de F. DE MÉNIL.
Unu volumo in-8, 20-paĝa . . . . » 60

Praktikaj komercaj leteroj (en esperanta kaj franca lingvoj), de J. C. O'CONNOR, Ph. Dr. M. A., kaj D. D. P. HUGON.
Unu volumo in-16. . . . . » 90

Provo de Marista Terminaro, verkita sub la direkto de M. ROLLET DE L'ISLE.
Unu volumo in 8 (*bindita*). 1 50

Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie, avec modèles de lettres (en français et Esperanto), par R. LEMAIRE.
Unu volumo in-8 . . . . » 40

Vocabulaire technique et technologique Français-Esperanto, par CHARLES VERAX.
Unu volumo in-8 (*bindita*). 2 50

MUZIKO

Himno al Zamenhof, paroloj kaj muziko de R. DESHAYS . . . . 1 »

La Vojo (kanto kaj fortepiano), paroloj de D[ro] ZAMENHOF, muziko de R. DESHAYS . . . . » 35

Esperanto (valso por fortepiano), muziko de F. DE MÉNIL. . . . . » 50

La kanto de l' cigno (melodio), poemo de SVIRIDOV, muziko de F. DE MÉNIL . . . . 1 »

Mi aŭdas vin, poezio de LEONO ZAMENHOF, muziko de F. DE MÉNIL . . 1 »

Kuŝas somero, poezio de TH. KANALOSŜI-LEFFLER, muziko de F. DE MÉNIL. . . . . 1 »

KOLEKTO ESPERANTO

Advokato Patelin, unuakta komedio de BRUEYS et PALAPRAT, tradukita de J. EVROT.
Unu volumo in-16 . . . . Fr. » 75

Albumo de Konataj Esperantistoj, de FRITZ SCHUCK.
Unu luksa volumo, 55-paĝa (ekzistas ankoraŭ nur kelkaj ekzempleroj). 3 »

Cikado ĉe Formikoj, el LABICHE et LEGOUVÉ, unuakta komedio.
Unu volumo in-16. . . . . » 60

Ĉu li? romano originale verkita de D^{ro} VALLIENNE.
Unu volumo in-16. . . . . 4 »

Diversaĵoj, rakontoj tradukitaj de S^{roj} LALLEMANT kaj BEAU.
Unu volumo in-16 . . . . 1 25

Don Juan, kvinakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de E. BOIRAC.
Unu volumo in-16 . . . . 1 50

Elektitaj Fabeloj de Fratoj GRIMM, tradukitaj de D^{ro} KABE.
Unu volumo in 16 . . . . 1 80

Elektitaj Fabloj de LA FONTAINE, esperantigitaj de G. VAILLANT.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

Eneido, de VIRGILIO, kantoj I-XII, tradukitaj de D^{ro} VALLIENNE.
Unu volumo in-16 . . . . 3 »

Esperantaj Prozaĵoj, de diversaj aŭtoroj.
Unu volumo in-16 . . . . 2 50

Inter blinduloj, de D^{ro} JAVAL, tradukis S^{ino} JAVAL.
Unu volumo in-16 . . . . 2 »

Internacia Krestomatio, elektis kaj tradukis D^{ro} KABE.
Unu volumo in-16 . . . . 1 50

Kastelo de Prelongo, romano originale verkita de D^{ro} VALLIENNE.
Unu volumo in-16 . . . . 4 »

Kiel ni plibeligos la vivon, originale verkita de SAĈULO.
Unu volumo in-16, 20-paĝa . . . . » 65

Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia, de A. GRABOWSKI.
Unu volumo in-16 . . . . 2 »

Kurso tutmonda, de E. GASSE.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

La Avarulo, kvinakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de S. MEYER.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

La fundo de l' mizero, romano de SIEROŠEVSKI (VACLAV), tradukita de D[ro] KABE.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

La interrompita kanto, romano de ORZESKO, tradukita de KABE.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

La koloriĝisto aerveturanto, gaja rakonto, de GODINEAU
Unu volumo in-16 . . . . » 30

La kvar Evangelioj, kunigitaj en unu rakonto, de Pastro LAISNEY.
Unu volumo in-16 . . . . 1 50

La nevo kiel onklo, triakta komedio de SCHILLER, tradukita de STEWART.
Unu volumo in-16 . . . . 1 »

Lernolibro de esperanta stenografio, de F. SCHNEEBERGER.
Unu volumo in-16 . . . . 1 »

Paĝoj el la Flandra literaturo, tradukitaj de D[ro] SEYNAEVE kaj D[ro] VAN MELCKEBEKE.
Unu volumo in-16 . . . . 1 50

Pola Antologio, elektita kaj tradukita de KABE.
Unu volumo in-16 . . . . 2 »

Poŝkalendaro Esperantista 1909.
Unu volumo in-16 . . . . 1 »

Poŝlibro internacia por aferistoj, turistoj, k. c., de NORMAN.
Unu volumo in-16 (*bindita*) . . . . 2 »

Pri unu speco de kurbaj linioj, von Prof. A. DOMBROVSKI.
Unu volumo in-16 . . . . » 60

Rakontoj pri feinoj, de PERRAULT (CH.), tradukitaj de S[ino] SARPY.
Unu volumo in-16 . . . . 1 »

Sub la neĝo, taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro, de J. J. PORCHAT, tradukita de J. BOREL.
Unu volumo in-16, 144-paĝa 1 25

Tri unuaktaj komedioj, de A. v. KOTZEBUE, T. WILLIAMS, S[ino] M. HANKEL.
Unu volumo in-16, 96-paĝa. . . . . 1 »

Unua legolibro, de D[ro] KABE.
Unu volumo in-16 . . . . 1 90

Verdaj Fajreroj, kolekto da versaĵoj de ROMANO FRENKEL.
Unu volumo in-16. . . . . 1 »

Verkaro, libro I[a], de DEVJATNIN.
Unu volumo in-16 . . . . 2 »

Vojaĝo interne de mia ĉambro, de MAISTRE, tradukita de S. MEYER.
Unu volumo in-16 . . . . » 75

Coulommiers. — Imprimerie PAUL BRODARD.

Librejo HACHETTE & K^io^, 79, boul. Saint-Germain, PARIS.

AĈETEBLE :

TUTMONDA
Jarlibro Esperantista 1908

ENHAVANTA LA

Adresaron de D^ro^ ZAMENHOF

Tiu ĉiu jarlibro aperis dum la Kongreso. Ĝi entenas : adresojn de Esperantistoj de l' tuta mondo, plenajn sciigojn pri la propagandaj societoj, la gazetoj en Esperanto, k. t. p.

Unu volumo in-16 (*broŝurita*). . . . . Fr 2

La Eldono 1909, en preparo, enhavos :

1^e^ — La **ADRESARON de D^ro^ Zamenhof.**
(Tiu adresaro estas la lasta. Novaj ne plu estos publikigitaj.)

2^e^ — La **SOCIETARO de Centra Oficejo**, entenanta la **liston** de la **esperantistaj societoj, grupoj**, kun la adreso de la komitatanoj kaj profesoroj de Esperanto, de la **Konsuloj-agentoj esperantistaj**, k. t. p.

3^e^ — La **liston** de la **Esperantistoj** skribantaj bone en Esperanto, kaj dezirantaj korespondadi.

4^e^ — La **liston** de la **firmoj, hoteloj, restoracioj**, k. t. p., kiuj uzas Esperanton.

5^e^ — **Grandajn reklamojn** de la **firmoj**, k. t. p.

Avizo. — Por **enskribiĝo** en la **estontaj eldonoj**, sin turni al la Administracio de T. J. **antaŭ la 31 de Decembro.**

En la **Societaro** la enskribiĝo estas senpaga.

En la **Korespondado** kaj en la **Esperantista Komercistaro**, simpla enskribo estas senpaga. Ĉiu aldono, ĉu por precizigi la temon aŭ la rimedon elektitan, ĉu por precizigi la komercon, kostas, en la Korespondado : **5 centimojn** por ĉiu vorto ; en la Komercistaron : **10 centimojn** por ĉiu vorto.

Por la **grandaj reklamoj**, peti la specialan tarifon al la Administracio.

Librejo HACHETTE & K^{io}, 79, boul. Saint-Germain, PARIS.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto

EN ESPERANTO

La **sola**, kiu estas honorata per la konstanta kunlaborado

DE

D^{ro} L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de la lingvo Esperanto

Plej bonstila, zorge revidita, bele presita, akurate eldonata, **La Revuo** publikigas novelojn, teatraĵojn, romanojn, poeziojn, seriozajn studojn pri popolmoroj, historio, geografio, k. c. Ĉiu numero enhavas bibliografian parton, kronikon kaj felietonon.

Konkursoj estas organizitaj.

Ĉiu numero havas 48 paĝojn da plej bona teksto !

Ĉiu jaro de la Revuo komenciĝas la 1 de Septembro.

Specimenoj estas senpage senditaj.

ONI ABONAS :

Francujo. — Librejo HACHETTE & K^{o}, Boulevard Saint-Germain, 79, *PARIS*, unu numero 50 centimoj, jara abono . . . . Fr. 6

Bohemujo. — F. TOPIĈ, Ferdinandova 11, *PRAHA*, unu numero 60 hell., jara abono. Kr. 6

Danujo. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade, 35, *KJÖBENHAVN*, unu numero 50 öre, jara abono. . . . . Kr. 4,50

Germanujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo. — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Lindenstrasse, 18-19, *BERLIN S. W*, unu numero 45 pfenigoj, jara abono. . . M. 5

Granda Britujo kaj kolonioj. — THE BRITISH ESPERANTO ASOCIO, Museum Station Building, 133-6, High Holborn, *LONDON W. C.*, unu numero 6 penc., jara abono . . . . S. 6

REVIEW OF REVIEWS, Norfolk street, *LONDON W. C.*, unu numero 6 penc. jara abono . . . . S. 6

Hispanujo. — J. ESPASA, 579, calle de las Cortes, *BARCELONA* jara abono . . . P. 8

Italujo. — R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, *LIVORNO*, unu numero 50 cent., jara abono . . . . L. 7

Polujo. — M. ARCT, Nowy Swiat, *WARSZAWA*, unu numero 25 kop., jara abono. R. 2,80

Rumanujo. — Librăria nouă CAROL P. SEGAL, Calea Victoriei, 78, *BUCURESTI*, unu numero 60 banoj, jara abono . . . . Leoj 7

Unuigitaj Ŝtatoj. — AMERICAN ESPERANTIST C^{o}, 235 Fortieth Street, *CHICAGO*.

FLEMING H. REVELL COMPANY, 158, Fifth Avenue, *NEW-YORK*, unu numero 10 cend., Jara abono . . . . D. 1 40

Por la landoj, kie ne estas abonejo, sin turni al firmo HACHETTE & K^{o} en *PARIS*; jara abono (por tiuj landoj) . . . . Fr. 7

Oni akceptas pagon de l' abono nur per poŝtmandato aŭ ĉeko.

Coulommiers. Imp. PAUL BRODARD. — 3-09.